



SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »
5, Quai Vauban - 66-PERPIGNAN (P.-O.) - Telefono 34-38-84

Jara Abono : 3 F. - C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 44

3-an Kvaronjaro 1972



NACIA KONGRESO EN NANTES

Mi ne volas trudi vin per enuiga raporto pri la Nacia Kongreso kiu okazis en NANTES, ĉar en la revuo Franca Esperantisto, vi legus plej kompetentan kaj kompletan raporton.


Laŭ mi du faktoj estas tre gravaj ;

- 1) La estraro de la Kongreso decidis la **aceton de Sidejo en PARIZO**. Kiel vi scias ni estos elpelitaj de strato Chabrol. Logika sekvo de nia vocĉono, estos sendo de brikoj aŭ parto de briko al U. F. E. C. C. P. n° 855-35 Paris « unu briko = 50 F. » Oni konstruas domojn pere da brikojn ! Ĉu ne ?
- 2) Gravega kaj bonega atingo de nia vic-prezidanto Jean THIERRY, kiu estas prezidanto de Franca Esperanto Instituto : tre baldaŭ, aperos en ĉiuj librejoj, grandaj magazenoj de FRANCIO kaj francparolantaj landoj, « **poŝlibro ; JE PARLE ESPERANTO eldonita de Marabout Flash** ». Tiu eldono rezultas fakte el malnova traktado, je 1965, kun eldonisto Gérard Verviers, kiu finfine alvenis al pozitiva konkludo dank'al streĉa kunlaborado de S-roj Thierry, Saudian-Rousseau kaj Bourdeaux. Tiu libro estas poŝformata, je modesta prezo, kun multaj desegnaĵoj, kaj krucvortoj.

Kiel esperantistoj ni postulis la publikigon tiel ni povas aceti en ĉiuj librejoj, esperantan malgrandan libron, **rimarku sen elpezoj flanke de nia Esperantista Movado.**

Ĉiuj francaj esperantistoj devos nepre certigi la sukceson de "**l'opération Marabout-Flash**"
Acetu la poŝlibron kaj petu al via librovendisto ke li metu ĝin en sian montrofenestron por ke la preterpasantoj vidu ĝin !!

Yvette VIERNE



NIMES. Junio.

Ni akceptis nian junan samideanon Nino Vessella el Roccaseca (Italio), aktiva membro de T.E.J.O.

Li faris al nia grupo interesan paroladon pri la rajto al homj paroli regionajn, etnajn lingvojn. Tiamaniere la homoj de tiuj etnoj parolis la regionan lingvon kun samregionaĵoj la nacian kun samnaciaĵoj kaj esperanton kun la tuta mondo.

Li plezure vizitis Nimes kaj la Ponto de Gard.

14-a BARCELONO-PROVINCA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

Ĝi okazis la 18-an de junio en Riells de Fai, pitoreska vilaĝeto en agrabla pejzaĝo je 40 km de Barcelono.

Pli ol du cent gesamideanoj kaj simpatiantoj partoprenis la renkontiĝon. Ceestis ankaŭ Ges-roj DELIGNE el Narbonne kaj Ges-roj AMOUROUX el Perpignan. Pro devigaj okupoj for de Perpignan, S-ro LLECH-WALTER ne povis partopreni la renkontiĝon.

La etoso estis simpatia kaj samideana. La programo konsistis el

- Mesa tute en Esperanto kuncelebrita de Pastroj Claramunt kaj Casanoves, ambaŭ delegitoj de U.E.A.
- Inaŭguro de Zamenhof-strato. La stratabulon malkovris la urbestro. Dankis la urbestron S-ro TUR THOMAS, vic-prezidanto de la Hispana Esperanto-Instituto, kaj S-ro DELIGNE.
- ĝenerala kunveno kun ĉeesto de la urbestro. Salutis la reprezentantoj de ĉiuj grupoj de la provinco, ĉirkaŭ 20. S-ro AMOUROUX salutis je la nomo de la katalunaj gesamideanoj de la franca flanko kaj transdonis inviton de S-ro LLECH-WALTER por ke unu el la venontaj renkontiĝoj okazu en Perpignan. Ĉar Perpignan situas je sama distanco de Barcelono kaj de la plej malproksimaj urboj de nia federacio estus interese tie aranĝi internacian renkontiĝon.

Festparoladis S-ro MOYA el Tarrassa. Sekvis skeĉoj kaj deklamadoj fare de la anoj de la junulgrupo de la klubo de Sabadell. Notinda estas la flua elparolo de la plej junaj aktoroj.

Komuna bankedo kun 170 partoprenantoj finis tiun agrablan tagon je la komenco de la bankedo belsone kantis Ĥoro de Barcelono.

Jean Amoureux

Proverbaro

- * *Donu fingron al avidulo, li tutan mano postulas.*
- * *Edzigu filon, kiam vi volas — Edziniĝu filinon, kiam vi povas.*
- * *Amiko de mia amiko estas ankaŭ mia amiko.*
- * *Antaŭe kion vi devas, poste kion vi volas.*
- * *Dio al vi donis, por ke vi povu doni.*

NIMES. Septembro kaj Oktobro.

Dank'al S-ro Raynaud, W. Nastaj, pola samideano el Lublin povis trovi mastron, kiu akceptis lin por la vinberrikolto en Aubais apud Nimes.

Li venis kun siaj gefiloj : Jano kaj Margarita. Bedaŭrinde nur li parolas esperanton kaj, se Margarita parolas france iomete kaj pene, Jano ne povis profiti nian konversacion.

Pro la prokrasto en la komenco de la vinberrikolto tiunjaron, niaj tri amikoj troviĝis sen laboro dum kelkaj tagoj. Por helpi ilin multaj es-istoj de la regiono kaj eĉ ties amikoj sin mobilizis por trovi alian laboron dum tiu tempo.

Ili tri partoprenis la unuan kunvenon de nia grupo fine de septembro.

Ni esperis la viziton de nia malnova amiko Eizo Itoo, kiu jam en 1960 venis en Nimes, kie li prelegis pri Japanio kaj kiu estas nun en Parizo.

Bedaŭrinde li devis rezigni tiun vojaĝon pro tempomanko.

Ges-roj Volpelière ĵus iris al Barcelono, kie ili vizitis la es-istojn tutmondistojn, laŭ la deziro de S-ro Vilagran, kiun ili ekkonis en Perpinjano en 1969. Ankoraŭfoje ili povis sperti la plezuron interparoli facile kun alilandanoj dank'al nia lingvo kaj male la malfacilaĵojn konversacii kun amikoj ne esperantistoj kaj tiel propagandi por esperanto.

INTERFEDERACIA RENKONTO.

Pli ol 120 gesamideanoj renkontiĝis en la VOKLUZA FONTO la 4an de Junio elvenintaj el Solliès-Pont, Gap, Marseille, Aix, Arles; Privat, Crest, Mazan, Narbonne, Montpellier, Avignon, la Grand'Combe, Nimes, Alès. Inter ili 40 junaj gejunaboj de la Esp. kurso de Solliès-Pont, gvidataj de S-ro Mathis kaj deko da gejunuloj, lernantoj de F-ino Faucher, S-ino Mourre (Gap) kaj de S-ino Volpelière (Nimes).


Komuna manĝo okazis ĉe la junulgastejo. Bonŝance la plimulto el la partoprenantoj piknikis, ĉar la manĝoĉambro estis plenplena. Eĉ kelkaj ne antaŭe enskribitaj devis iri en restoracion.

Post la tagmanĝo, Raynaud dankis al la ĉeestantoj, Lentaigne donis interesajn informojn kaj sub la gvidado de S-ino Gente, ĉiuj gaje kantadis.

Je la 15a, ope, babilante la samideanaro sin direktis al la mondfama fonto.

Tiu renkonto obligis al esperantistoj de 9 sudfrancaj departementoj retroviĝi aŭ interkonstiĝi en agrabla kaj frateca etoso.

René RAYNAUD



POR PLIBONIGO DE LA KASTELO GRESILLON (Greziĵo)

La Kultura Asocio de la Kastelo de Grésillon, Baugé, 49, Francujo intencas konstruigi ĉambrigon por prelegoj kaj kursoj. Efektive nun mankas lokojn, ĉar la Kastelo estas pli kaj pli vizitata de multaj samideanoj.

La Asocio alvokas ĉiujn esperantistojn por kontribui, eĉ per modesta sumo, al la plibonigo de la kastelo, belega realaĵo de la esperantistaro.

Oni povas sendi la monon, per poŝtgiro al "Association Culturelle du Château de Grésillon, Cheque Postal 2.512.77, NANTES" aŭ per bankĉeko al la kasisto S-ro COUSSE Maurice, II, Rue Alain de Rougé, 72- SABLE SUR SARTHE (Francujo).

Cette souscription est divisée en "ŝtonoj", une "ŝtono" vaut 100 francs mais il y a possibilité de souscrire une 1/2 "ŝtono", (50 francs), 1/4 de "ŝtono" (25 francs). Pour que tous les esperantistes et amis de l'esperanto puissent y participer il y aura des "stonetoj" à 5, 10, 15 et 20 francs. Ainsi dans une même famille, du plus jeune au plus âgé, tous pourront participer à l'oeuvre de construction.

Vous pouvez en parler à vos amis non-esperantistes mais sympathisants, ils pourront ainsi montrer leur attachement à la cause de la compréhension universelle en souscrivant une part, si modeste soit-elle.

René LIECH-WALTER.

"PENSER, C'EST VIVRE"

"PAR L'ESPERANTO LA PENSÉE DEVIENT UNIVERSELLE"

Tel est le slogan qui se trouve sur la carte de membre de l'Association Culturelle du Château de Grésillon à côté du dessin stylisé du Château de Grésillon.

Vous pouvez recevoir cette carte en virant la somme de 5 francs au C.C.P. Association Culturelle du Château de Grésillon 2.512.77 -NANTES.

Cette association groupe "Les amis de l'Espéranto" et "les amis de Grésillon" c'est à dire aussi bien des esperantistes chevronnés que des sympathisants de la langue internationale.

Adhérez et faites adhérer vos amis, vous contribuerez ainsi au maintien de la merveilleuse création du regretté MICARD, ce haut lieu de la culture esperantiste qu'est le Château de Grésillon.

Pardonu se restas eraroj, kulpas la tajpado. Nia afabla tajpistino ne scias Esperanton.

Ronéotipé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Dépôt Legal : Troisième Trimestre 1972

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II, Z.U.P. - 30 - NIMES